# TAGIĜO

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA
SCS - Edifício Goiás - s/603
Tel.: 225-4761
Caixa Postal 04-0406
70000 - Brasília-DF - BRAZILO


S-ro
Nelson Pereira de Souza
Caixa Postal 07-1055
70000 Brasília DF

DECEMBRO 1980

## SEMAJNO DE ESPERANTO EN LA FEDERACIA DISTRIKTO

La Zamenhof-festo havis ĉi jare en Brasília eksteran karakteron. Sub la kunordigado de la vic-prezidanto de nia asocio, S-ro Nelson Pereira de Souza, de la 13a ĝis la 21a de Decembro, serio de prelegoj pri Esperanto kaj prezentadoj de la 66-a UK okazis en "Plano Piloto", Sobradinho, Guará, Taguatinga kaj Cruzeiro Novo. Kulminaj punktoj de la manifestacio estis intervjuo ĉe la populara tagmeza elsendo "Brasília Urgente" de loka televida kanalo 6 kaj prezentado de FIAT-filmo en Esperanto ĉe la Komerca Asocio antaŭ kvindeko da entreprenistoj interesitaj pri la aplikado de la Internacia Lingvo en komerco kaj industrio. La oficiala organo de ACDF, "Vanguarda" publikigis raporton en sia decembra numero.

## KALEJDOSKOPO PRI LA UNIVERSALA KONGRESO

- Fine de Novembro, taĝurnalo "Correio Brasiliense" publikigis intervjuon faritan dum la vizito de Simo Milojevic en Brasília.
- Alloga artikolo pri Brazilo, de Leopoldo Knoedt kaj alia frandaĵo de Jorge Amado, tradukita el "Unesko-kuriero", aperis en la revuo "Esperanto" de UEA (oktobro 80).
- En la kadro de la artaj programoj de la kongreso, jam estas konfirmita la ĉeesto de pupteatro el Lima (Peruo), kiu prezentos teatraĵojn en Esperanto.
- Por tendumantoj estos je dispono senpage la bone ekipita tendumejo de Brasília, je distanco de ĉ. 20 minutoj piede de la kongresejo.



ĜOJIGA INFORMO por ĉiuj esperantistoj estis la reelekto de S-ro Amadou-Mahtar M'Bow kiel ĝenerala direktoro de UNESKO por plia sepjara mandato. Dum la Universala Kongreso de Esperanto en Islando (1977), S-ro M-Bow esprimis la deziron viziti Brazilon okaze de nia planita kongreso.

Ĉu li plenumos tiun deziron?
Eble jes, ĉar li jene respondis al la gratul-mesaĝo al li sendita de D-ro Tonkin: "Mi esperas vidi la kunlaboron inter Unesko kaj Universala Esperanto-Asocio fortikiĝi en la estonteco".

### IDEOJ ESTAS BEZONATAJ

Kiel jam anoncite, la 25an de Julio 1981, la brazila poŝto lanĉos memorigan poŝtmarkon okaze de la 66-a UK en Brasília. La Loka Kongresa Komitato estis invitita prezenti sugestojn al ECT pri la temo de la pm.

Jen do favora okazo por niaj reklam-desegnistoj aktive partopreni en la kreo de la oka Esperanto-poŝtmarko eldonota de la brazila poŝto.

Ni invitas ilin sendi grafikajn ideojn NEPRE ANTAŬ LA 20a DE FEBRUARO al:

LKK de la 66a UK de Esperanto
SCS Ed. Jockey Club, sala 103
Caixa Postal 04-0406
70000 - Brasília - DF

La aŭtoro de la ideo elektota por la poŝtmarko, ricevos libro-premion !!!

**AL ĈIUJ MEMBROJ DE NIA ASOCIO NI DEZIRAS PROSPERAN KAJ FELIĈAN 1981**

## EN BEOGRADO LA 21-a ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO

Delegitaroj de 135 ŝtatoj membroj de UNESKO kunvenis en la jugoslava ĉefurbo de la 23a de Septembro ĝis la fino de oktobro 1980.

La temo pri komunikado estis pritraktita en aparta komisiono kaj, dum tiu diskuto, la reprezentanto de UEA, Mag. Tibor Sekelj, havis okazon paroli pri Esperanto dum dek-minuta interveno. Li menciis la ĉefajn atingaĵojn de la Internacia Lingvo kaj emfazis, ke ĝi estas la solvo preta atendanta alprenon. Dum la postaj interparoloj, montriĝis aparte favoraj al niaj tezoj la delecacioj de Nederlando, Tunizio, Kongio, Aŭstrio, Papua Nova Guineo, Honduraso, Norda Koreo kaj Tanzanio.

La evoluo de la rilatoj inter nia movado kaj UNESKO estas tre esperiga.

## PREPARU VIN POR DU GRAVAJ EVENTOJ !

22a - 28a de Februaro

### Semajno de Internacia Amikeco

La ideo okazigi ĉiujare Semajnon de Internacia Amikeco estis lanĉita en 1968 de Eric Carlén, tiam vicprezidanto de UEA. La celo de la Semajno estas celebri homajn kontaktojn transnaciaj limoj per Esperanto kaj krei komunan tradicion, kiun povus partopreni ankaŭ neesperantistoj de ĉiuj landoj.

La Semajno estas celebrata ĉiujare en multaj landoj kaj donas oportunan okazon informadi la eksterajn mediojn pri nia lingvo kaj movado. Ankaŭ por 1981 ni devos ion fari en nia urbo, kunlige al la ĝenerala interesiĝo pri Esperanto vekita de la Universala Kongreso.

Je individua nivelo, estas tradicia kutimo utiligi la Semajnon por sendi amikajn esprimojn al niaj tutmondaj geamikoj kaj korespondantoj. Tiucele, UNICEF eldonis gratulkartojn kun la teksto "Kun bondeziroj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco". Dek kartoj (minimuma mendokvanto ĉe UEA), kostas, kun koverto, 11,00 Gld. La profito iras al UNICEF.

Ekvinokso: 21a de Marto

### Tago de la Tero



Ek de 1970, oni komencis festi en Usono, je la Ekvinokso la 21a aŭ 22a de marto, la Tagon de la Tero. Al tiu movado, kiu celas la vartadon kaj konservadon de nia planedo, jam aliĝis la sekretarioj de UNO, U Thant kaj Kurt Waldheim.

En multaj landoj la homoj komencis konsciiĝi, ke saĝa utiligo de naturaj rimedoj kaj efika uzado de teknologio sen detrui la propran medion, estas esencaj kondiĉoj por ebligi la daŭrigon de la vivo sur la tero.

UEA jam rekomendis al la Esperanto-Grupoj tra la mondo aliĝi al la festado de la Tago de la Tero kaj konvinki ankaŭ ne-esperantistojn kunlabori. Je tiu tago oni invitas ĉiujn homojn sonorigi la sonorilojn de siaj preĝejoj, temploj, urbodomoj, ktp, por iniciati momenton de silenta meditado kaj sindediĉo pri la estonteco de la Tero kaj ĝiaj loĝantoj.

## NOVAJ ELDONAĴOJ DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Por mordenigi la instruadon de Esperanto en nia lando, BEL lanĉis 2 librojn kaj 2 diskojn, kiuj jam vekis notindan eĥon en la instruistaj medioj:

"AŬDU KAJ LERNU" - Lernolibro de Sylla Chaves por uzo kun la logolibro "NOVA AMIKO INTER NI" - de la sama aŭtoro, kiu uzas 1000 plej oftajn vortojn.

"LA ALFABETO DE ESPERANTO KAJ FACILAJ FRAZOJ" - Duflanke disko 33 t/m, 18 cm. Kantas kaj deklamas Joel de Castro k.a.

"KANTU KAJ LERNU" - Duflanka disko 33 t/m, 18 cm. 11 kantoj en prezento de Joel de Castro, Franca Fenati kaj aliaj.

MENDU ILIN ĈE: BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Praça da República, 54 - 2º andar
20211 - Rio de Janeiro - RJ